por la oreloj de ĉiu bona esperantisto«. (Dro L. L. Zamenhof, LINGVAJ RESPONDOJ (plena kolekto) Paris, 1936, paĝoj 53-54).

Mi deziras atentigi precipe pri la tezo, ke en dubaj kazoj la artikolo tute ne estas uzenda. Ĉie oni rimarkas ĝian trouzon. Ni komencu lerni la regulan uzadon per sindeteno. Bona konsilo por pruvi neceson de la artikolo estas ĝia anstataŭo per la vortoj »tiu« aŭ »tiu ĉi«. Se post la ŝanĝo senco de frazo ne aliiĝas, la artikolo estas ĝuste uzita.


R e s u m o

Influo de naciaj lingvoj kun diversa uzado de artikoloj kaŭzis haosan staton en Esperanto ĉi- rilate.

Por strebi al reguleco ni devas obei nur la sole validan regulon pri uzado de la artikolo, donitan en »Fundamento de Esperanto«: **»La artikolo »la« estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj«.** Konataj ili devas esti ne nur al parolanto aŭ skribanto, sed ankaŭ al aŭskultanto kaj leganto.




SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 20. n-ro 2 (1969)

408.9

## ATENTINDA VERKO

(R. Sikorski, Omsk, Sovetunio)*

En la 1968. en Sovetunio aperis libro, eldonita de la Instituto de Filozofio de la Akademio de Sciencoj. Ĝia titolo estas „Kiel kreiĝos universala lingvo?" La libro estas frukto de pli ol tridekjara laboro de ĝia aŭtoro E. Svadost super la temo. Sur 286 paĝoj la aŭtoro defendas la tezon, ke estonta universala lingvo de la homaro estos lingvo laŭplane kreita de lingvistoj en kunlaboro kun homamasoj. La aŭtoro ne akceptas la ideon de internacia h e l p a lingvo; li aspiras al unusola universala lingvo de la tuta homaro, lingvo, kiu nur dum relative mallonga periodo ludos la rolon de h e l p a lingvo, la dua post la gepatra.

E. Svadost skizas planon de tiu lingvokreado, kies realigon li opinias necesa komenci jam nun. Lia plano antaŭvidas fondon de la granda aro de diversaj institutoj por teoria studado de la problemo de diversaj flankoj: filozofia, lingvistika ktp. poste sekvos ellaborado de teoriaj principoj sur kiuj baziĝu la kreado de universala lingvo kaj nur post tio sekvos la kreado mem, efektivagata de kolektivoj de interlingvistoj. Lia plano antaŭsupozas tiom grandan nobron de interkonsentoj inter diversaj aŭtoritatoj, institucioj, lingvistoj ktp. ke ĝia realigo aperas tute utopia — almenaŭ dum proksimaj jarcentoj.

La aŭtoro mem faras nur malmultajn proponojn pri la lingva aspekto de universala lingvo. Interalio li eldiras interesan ideon, nome ke leksikonoj de materialaj valorajoj, de ekonomiaj produktaĵoj, estu kreitaj laŭ principo de aprioraj lingvoprojektoj (ekzemple Ro), dume ke la komuneuzataj vortoj elektiĝu laŭ aposteriora principo el naciaj lingvoj Kiamaniere interadapti la du manierojn estas problemo solvenda.

---

*) Dolgireva 60, kv. 29, OMSK 33, Sovetunio

Ĉar nek Esperanto, nek iu ekzistanta kabineta projekto de internacia lingvo kongruas kun la planoj de Svadost, li senkonpromise forbalaasilin. Precipe akre li kontraŭbatalas Esperanton, uzante pseŭdoverajn asertojn, kiuj malkovras unu dekonon da vero kaj kaŝas naŭ dekonojn. Sekve de tio ninformita kaj facilkredema leganto de la verko ricevas tute distorditan bildon de Esperanto — movado kaj de Esperanto mem. Tia neobjektiva kaj sekve nescienca prezento de Esperanto flanke de la aŭtoro devigis unu el la tri respondecaj redaktoroj de la verko, nome la Esperanto — akademianon E. Bokarev, fari specialajn rezervojn en la redakta antaŭparolo.

La aŭtoro ne volas kompreni, ke nek lia universala lingvo nek iu helpa lingvo internacia falos desur scienca Olimpo en tute preta formo (ĉiuj butonoj alkudriataj). Tia lingvo formiĝos en procezo de interagado inter la jam ekzistanta interlingvistika praktiko laj lingvoscienco.

Malgraŭ tiu ĉi manko, la verko estas tre utila kaj interesa. Ĝi enhavas bone argumentitan tezon, ke universala lingvo estos lingvo racie kaj emocie k o n s t r u i t a . Riĉa historia materialo kaj abunda bibliografio faras la verkon prominenta fenomeno en la sfero de interlingvistiko.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 20. n-ro 2 (1969)

408.9:418

## »KIEL APEROS LA ĜENERALA LINGVO?«

**(Ekaterina Mihajlova, Sofio, Bulgario)***

La problemoj de la interlingvistiko kaj pli speciale la problemo pri la neceso de internacia lingvo lastatempe ĉiam pli ofte altiras la atenton de la scienca penso. Kaj tio estas klarigebla. La grandioza evoluo de la internaciaj rilatoj, ĝis kiu venis la nuna epoko, deninitive metis la problemojn de la interlingvistiko kaj antaŭ ĉio la problemon pri kreado de internacia lingvo sur antaŭan planon en la interesoj de la monda kultura socieco. La funkciado, en la nuna epoko, de jam kreitaj internaciaj lingvoj, unualoke Esperanto, prezentas tiel diri ĉiaman stimulon por prilarĝiĝo kaj pliprofundiĝo de tiuj ĉi interesoj. Inter multaj esploroj kaj studoj de problemoj de la interlingvistiko kaj pli speciale de problemo pri la neceso de internacia lingvo apartan atenton meritas la monografio de la soveta aŭtoro E. Svadost »Kiel aperos la ĝenerala lingvo? (en la rusa lingvo), eldonejo »Scienco«, Moskvo, 1968.

Laŭ la aŭtoro la problemo pri kreado de internacia lingvo estas »gravega neceso de nia tempo«, kiel estas titolita ankaŭ la unua ĉapitro de la monografio. Hodiaŭ, ĉe la mirinda evoluo de la scienco kaj la tekniko kaj ne pli malgrandaj atingaĵoj en la socia vivo nur »la lin-

*) Scienca kunlaboranto — Instituto pri bulgara lingvo en Bulgara Scienca Akademio.